



Cent dek tri humuraĵoj
AUGUSTO J. LOIRA

Reviziis R. Cash

Cent dek tri humuraĵoj estis sendita elektronike al mi de R. Cash. Li havis mane eldonon de 1910. Ŝajnas, ke oni nuntempe ne vendas tiun libron do ni enretigis ĝin.

Luiz Portella

Torixoréu libroj - <http://www.lujz.org/libro/>.

: -)

1

En vilaĝeto de Andaluzio, la protektata de la suno, kie regas ĉiam spriteco kaj bonhumoro, loĝas sinjoro Petro, komisiito el tiuj, kiuj veturas en la ĉefurbojn por akiri kaj alporti al malgrandaj vilaĝoj ĉiujn mendaĵojn, kiujn oni al ili antaŭe faris.

S-ro Petro estis bonulo multjara, ĉiam afabla kaj ridetanta, kaj tiel lerta, ke laŭ konfeso de ĉiuj liaj amikoj, neniam oni trompis lin en la aferoj rilatantaj lian negocon.

Kiel agis li por ĉiam triumfi je siaj samlandanoj, malbonaj pagantoj? Jen estas ekzemplo:

En kvieta vespero de Julia monato, S-ro Petro staris sur trotuaro apud sia hejma pordo, ricevante mendojn pri vojaĝo, kiun li estis tuj faronta.

Amaso da infanoj alvenis al li, ĉirkaŭis lin, kaj unue ĥore, poste unuope, diris al li:

“Ho, S-ro Petro! Alportu al mi fajfilon!”

S-ro Petro ridetis, kaj afable diris al ĉiu:

“Bone... tre bone... perfekte... komprenita, k.t.p.”

Li karesis ĉiujn kaj nek akceptis nek rifuzis la petojn.

Kiam tumulto pasis, anĝelo kvinjara modeste vestita, sed ekstreme pura, alproksimiĝis al S-ro Petro kaj balbutante diris:

“Ho, S-ro Petro! multfoje mi mendis al vi fajfilon, kiun mia patro estus paginta al vi, kaj vi, S-ro Petro, neniam ĝin alportis al mi; hodiaŭ mia patrinoj donacis al mi unu hundineton ¹, prenu ĝin kaj alportu al mi fajfilon.”

S-ro Petro ekkaptis inter siaj brakoj la beletan infanon kaj kisante lin, respondis:

“VI FAJFOS!”

2

Sesjara knabino vangofrapis sian pli junan fratiron.

“Kial vi tion faras?”, oni diris al ŝi.

“Mi ludas kvazaŭ mi estus patrino”, ŝi respondis.

¹ Oni nomas hundineto moneron, kies valoro estas kvin centimoj de peseto.

3

Malfeliĉa bofilo, gramatika profesoro, diras al siaj lernantoj, klarigante la malsamajn signifojn de la vortoj **akcidento** kaj **bedaŭro**.

“Supozu ke vi marveturas kun via bopatrino kaj ŝi falas en la akvon. Tio estas akcidento.”

“Supozu ke tuj maristo sin ĵetas en la akvon por ŝin savi. Jen vera bedaŭro.”

4

“Kia feliĉo,” ŝi diris al amikino, “se homoj estus anĝeloj!”

“Jes, kara mia, ĉiuj kiuj amis min estis tiaj.”

“Kiel?”

“Ho..., ĉar ili forflugis!”

5

Al lando alvenas epidemio. La registaro ordonas ke en ĉiuj urboj oni prenu antaŭgardojn kontraŭ la malamiko. Urbetestro respondas:

“Mi plenumis viajn dezirojn. Fosajoj estas malfermitaj por mi kaj por la ceteraj ĉi-tieaj genajbaroj.”

6

Geedzoj iras tra strato. Li multe drinkis kaj insultas ĉiun kiun li trovas. Homo ofendita de li diras al li:

“Mi eble rompos al vi unu ripon.”

La drinkema edzo gaje respondas:

“Mia kara, mi havas la honoron prezenti al vi mian edzinon.”

7

La juĝisto:

“Ĉu vi ŝtelis tion pro kio oni kulpigas vin?”

La kulpigito:

“Mi... ne, sinjoro. Kaj via Moŝto?”

8

Nov-zelanda estro petas de misiisto ke li baptu lin.

“Kiom da edzinoj vi havas?” demandas la pastro.

“Du”, respondas la sovaĝulo.

“Do, mi ne povas bapti vin, ĉar mia religio malpermesas poligamion.”

Post malmulte da tempo revenas la sovaĝulo kaj diras:

“Vi jam povas bapti min. Mi nun havas nur unu edzinon.”

“Kaj la alia?”

“Mi manĝis ŝin.”

Jen la imago kiun oni havis pri Nov-Zelando en 1910! Mi fakte konas novzelandanon (eĉ fama en la Movado) kiu havis plurajn edzinojn... sed sinsekve. Kaj mi ne kredas ke li manĝis la eksajn!

9

Du edzoj parolas pri kiam ili ekkonis siajn edzinojn.

“Mi” diras unu el ili, “ŝin ekkonis tri monatojn antaŭ nia geedeziĝo.”

“Nu” diras la alia, “mi ekkonis la mian tri horojn post ĝi.”

10

Sesdekjara sinjorino havas filinon kiu ŝajnas kvazaŭ samaĝa kiel ŝi.

“Oni asertas ke ili estas du fratinoj,” diris la cenzuristo, “sed pli prave oni povus diri ki ili estas du patrinoj.”

11

“Leviĝu, Paĉjo, forlasu la liton! Dio helpas tiun kiu matenfruas. Vi jam scias ke nia najbaro hieraŭ ektagiĝe trovis moneron sur strato.”

“Pli matenfruis la perdinto! Lasu min dormi, patrino!”

12

Edzino preĝas ĉiutage al Sankta Antonjo, por ke ŝia edzo fariĝu honesta homo. Post kelkaj monatoj, la homo mortis, kaj la vidvino, antaŭ la Sankta Figuraĵo, diras:

“Dankegon, mia amegata Sanktulo! Vi faris ankoraŭ pli ol mi petis de vi.”

13

Almozulo staris petante almozon de statuo.

“Kial vi tion faras?” oni diris al li.

“Por kutimigi min ke oni nenion al mi donos.”

14

“Kelnero! Ovaĵon.”

“Ni ne havas.”

“Kaj viandon?”

“Ankaŭ ne.”

“Kaj fiŝon?”

“Ankaŭ ne.”

“Do, kial oni anoncas la manĝadon laŭvole?”

“Sinjoro, ĝi estas laŭvole de la restoracimastro.”

15

“Mia patrino! Mi ne volas edziniĝi je Rikardo. Li diras ke infero ne ekzistas.”

“Trankviliĝu, filneto! Kiam mi estos lia bopatrino, tiam mi konvinkos lin pri tio.”

16

“Diru, mi petas, kiu estas la plej mallonga vojo por iri al la malliberejo?”

“Plezure: Ĉu vi vidas tiun sinjoron? Nu, forprenu lian horloĝon, kaj oni kondukos vin tien.”

17

Memvola soldato estis vundita. Kuracisto kiu lin kuracas diras:

“Tiu ĉi homo mortos; la kuglo trapasis lian cerbon.”

“Ne eble, sinjoro,” diras la soldato, “ĉar mi tion ne havas; se mi havus cerbon, mi ne estus veninta tien ĉi!”

18

En lando pluvis ĝustatempe. Kamparano diris:

“Tiun ĉi jaron eliros el la tero ĉio kion ni metis sub ĝin.”

Kolego al li respondis:

“Je Dio, ne diru tion, amiko! Mi havas sub tero mian bopatrinon!”

19

En razejo:

“Kiel vi volas ke mi vin razu?”

“Silente.”

20

Tre maljuna homo demandas kuraciston:

“Ĉu vi kredas ke mi bezonas iajn akvojn?”

“Sendube.”

“Kaj kiuj, laŭ via opinio, estas la plej taŭgaj por mia malsano?”

“Tiuj ajn kiujn vi volas, kondiĉe ke ili enhavu sufiĉe da sapo.”

21

Vidvo montras sian ĝardenon al gastoj amikaj.

“Vidu,” li diras, “el tiu ĉi arbo sin pendigis miaj tri malfeliĉaj edzinoj.”

Unu el la ĉeestantoj, kiu estis edzo, petis tuj de la vidvo branĉeton de la arbo, por ĝin semi en ĝardenon sian.

22

“Kio estas kan-fiŝkaptilo?”

“Ho, kiu havas fiŝhokon ĉu unu fino kaj simplanimulon ĉe la alia fino.”

23

Komercisto, montrinte al kamparano ĉiujn tasojn kiujn li havas en la vendejo, mirigita aŭdas la aĉetanton diri:

“Vi ne havas tion kion mi deziras. Mi volas tason kiu havus la prenilon kontraue metitan ol la viaj, tio estas, sur la alia flanko de la rondo.”

24

Fianĉo konfesdonas la tagon de sia edziĝo. Finita la afero, li diras al sia konfesprenanto:

“Patro! Vi forgesis diri al mi la punon.”

“Ne,” respondis la lerta pastro. “Vi jam ĝin havas.”

25

Junulo diras al fraŭlino:

“Certe mi divenus tion kion vi pensas.”

“Certe ne,” ŝi respondas, “ĉar se vi konus mian penson, antaŭ longe vi estus foririnta.”

26

En Sankta Vendredo, ludinto plendas tial ke li perdis multe da mono.

Amiko de li diras:

“Kompreneble vi perdis, ĉar vi ludis en tiu sankta tago.”

La perdinto respondis:

“Ĉu la gajninto ludis en Pasko?”

27

“Plaĉus al mi esti stelo,” diras sinjorino.

“Plaĉegus al mi ke vi tion trafus,” respondas al ŝi ŝia edzo, “ĉar la plej proksima stelo estas tre malproksima.”

28

“Mi vetas kvin pesetojn ke vi respondos nee al demando kiun mi faros al vi...”

“Vetitaj!”

“Ĉu vi pruntos al mi kvin pesetojn?”

“Ho, tion ne!”

“Do, venigu la kvin pesetojn al mia poŝo. Vi malgajnis.”

29

“La tamburo kiun vi vendis al mi, ne sonas.”

“Mi tion esperis.”

“Kaj kial vi faras tamburojn?”

“Por ilin vendi.”

30

“Ĉu vi vidas tiun homon? Mi malamas lin.”

“Kial?”

“Li petis antaŭ ol mi la manon de mia edzino, kaj oni rifuzis lin.”

31

Karbisto demandis sian kolegon:

“Ĉu vi ĉeestis hieraŭ en maskobalo?”

“Jes.”

“Mi ne vidis vin. Ĉu vi iris maskovestita?”

“Ne, sed estis neeble rekoni min, ĉar mi antaŭe estis min baninta.”

32

Ĉe fraŭlinoj. Antaŭ la dudeka jaro:

“Kun kiu mi edziniĝos?”

Post la dudeka jaro:

“Kiu edziĝos kun mi?”

33

Virino diras al sia edzo:

“Mi ne scias kial ni ne estas feliĉaj. Ni havas nur unu volon: vi volas estri la domon... kaj ankaŭ mi!”

34

“Kiam vi pagos al mi la kvin pesetojn kiujn vi ŝuldas al mi?”

“Ne estas kvin, ili estas dek”, respondas la ŝuldanto.

“Vi eraras. Mi pruntedonis al vi nur kvin pesetojn.”

“Ho! Mi preferas ŝuldi al vi dek pesetojn, ol pagi al vi kvin!”

35

“Ĉu Dio estas ĉie?”

“Jes, sinjoro.”

“Do, Li estos ankaŭ en la korto de via domo...?”

“Ne, sinjoro.”

“Kial ne, malsprita knabo?”

“Tial ke mia domo ne havas korton, respektinda instruisto.”

36

Fianĉo, baldaŭ edziĝonta, diras en la hejmo de sia fianĉino:

“Morgaŭ matene ni geedziĝos, ni matenmanĝos en hotelo, vespere ni forveturos Italujon...”

La estonta bopatrino:

“Tre malbone...”

La fianĉino:

“Patrino! Lasu lin paroli: la malfeliĉulo ordonas sian lastan volon.”

37

“Ĉu vi volas klarigi al mi la nunan aferon pri la kapitalo kaj la laboro?”

“Jes. Vi pruntedonas al mi cent pesetojn. Tio estas la kapitalo. Poste mi ne volas ilin redoni al vi. Jen estas la laboro.”

38

En vagonaro, sinjoro montras per sia montrofingro al la kunvojaĝantoj la domojn kiujn ili vidas pase, dirante pri ĉio:

“Mia.”

Unu el tiuj ĉi sinjoroj diras al li:

“Sinjoro, vi eraras; tiu domo estas de iu amiko mia.”

La interrompito respondas:

“Mi ne rilatas pri domoj, sed pri mia fingro!”

39

“Ĉu eble vi reedziĝos?”

“Jes, sed mi edziĝos kun bofratino.”

“Ĉiam estas edziĝo.”

“Jes, sed mi gajnos ne ricevi alian bopatrinon.”

40

Urbestro diras al siaj administrantoj:

“Ĝis nun, karegaj, ni estas devigataj sendi niajn frenezulojn al nia ĉefurbo. Mi esperas el via ŝparemo la ĉitiean starigon de frenezulejo, nur por ni.”

41

Peto:

“Kara amiko, sendu al mi, mi petas, pian libron titolitan **Timo de Dio**.”

Respondo:

“Karega, mi trairis la tutan urbon kaj mi ne trovis librovendiston kiu havas **Timo de Dio.**”

42

“Kial vi ne loĝas en Madrido?”

“Tial ke tie la vivo estas karega. Mi tion farus nur se mi, bedaŭre, havus la feliĉon vidviĝi.”

43

“Fraŭlino! Vi povas laŭdi vin ke vi faris el mi aŭtomatulon.”

“Ne, sinjoro, tio estis afero de viaj gepatroj.”

44

“Kolego! Ni jam sufiĉe drinkis. Ni devas reveni hejmen.”

“Vi eraras. Foje mi drinkas tro, sed neniam sufiĉe.”

45

“Memoru ke ni estas dum la Sankta Semajno, kaj ke vi devas trudi al vi kelkan ĝenon.”

“Bone, bopatrineto, mi promenadis kun vi la Sanktan Ĵaŭdon.”

46

Patro diras al sia filo:

“Ĉu vi scias kiam mi batos vin?”

“Jes, paĉjo, tial ke vi estas pli forta ol mi.”

47

Sinjoro invitis manĝi manĝegemulon, kaj donis al li unue konfitajon.

La gasto ekdiris:

“En mia lando, oni prezentas laste tiun ĉi manĝajon.”

“Ankaŭ ĉi tie”, respondis la invitanto.

48

“Estas malfacilege ke virino feliĉigu viron.”

“Vi eraras. Mi trovis unu.”

“Ĉu vere?”

“Jes. Ŝi promesis edziniĝi kun mi, kaj ŝi tion faris kun alia.”

49

En ekspozicio, antaŭ pentraĵo:

“Kion figuras tio?”

“La paŝadon de la israelidoj tra la Ruĝa Maro.”

“Kaj kie estas la maro?”

“Ĝi jam foriris.”

“Kaj la israelidoj?”

“Ili jam trairis.”

“Kaj la egiptanoj?”

“Ili venos poste.”

50

“En Kalifornio, kiam mi tie estis, oni povis aĉeti grandan arbaron por paro da botoj.”

“Kial vi ne ĝin aĉetis?”

“Ĉar mi ne havis botojn.”

51

“Kion ni donacos al via patrino, kara edzineto, en ŝia nomfesto?”

“Iun veston.”

“Ne, vesto tuj rompiĝos. Ni donu al ŝi arĝentan teleraron; tio estas malavara donaco, kaj poste ni ĝin rehavos.”

52

Senhara sinjoro ĉiam konsilas al sia nevo kion li devas fari pri tiu aŭ alia afero.

Iutage la nevo ĝenita diris al li, metante siajn fingrojn en sian sufiĉegan kapharon,

“Onklo! Faru tion ĉi!”

53

“Vi malbone faras, drinkante. Ĉu vi ne vidas ke vi ĉiumomente faletas aŭ falas kiam vi marŝas?”

“Mi ne malbone faras, drinkante, sed marŝante post la drinkado.”

54

“Sinjorino, oni ĵus mortevundis vian edzon!”

“Dio pardonu la mortiginton!”

“Sinjorino, li ankoraŭ ne mortis; eble oni povas savi lin.”

“Dio mia, punu la kulpulon!”

55

“Mastro, oni diris al mi ke vi havas multe da azenoj; mi vidas nur du en via stalo, kaj ni estas dek ekskursantoj.”

“Trankviliĝu, mia sinjoro. Kiom da ekskursantoj vi estos, tiom da azenoj vi vidos.”

56

Du sinjoroj, el kiuj unu estis maljuna kaj malbela, deziris edziĝi je belega dekok-aprila fraŭlino. Kiam alvenis la decida tago, tiam ŝi elektis la maljunulon.

“Kial vi tion faris?” diris amikino de ŝi.

“Tial ke mi amas ilin ambaŭ, kaj mi edziniĝos je la junulo post la morto de la maljunulo.”

57

“Kien vi iras?”

“Al la menaĝerio.”

“Tie vi trovos mian edzon kaj mian bopatrinon.”

58

Kioma horo estas la plej oportuna por manĝi?

Por riĉulo, tiam kiam li volas; por malriĉulo, tiam kiam li povas.

59

“Infano, ĉu via patrino ĉeestas?”

“Ne, sinjoro, ŝi foriris.”

“Kaj ĉu vi scias kiam ŝi revenos hejmen?”

“Atendu momenton, sinjoro. Mi tion demandos al ŝi.”

60

Inter geedzoj:

“Kion vi farus, Ernesto, se mi mortus?”

“Mi frenezigus.”

... “Ĉu vi reedzigus?”

“Ne, mi ne frenezigus ĝis tiu punkto.”

61

Juĝisto diras al kulpigito:

“Vi sciigis min ke vi parolis kun Alberto, kaj nun vi diras ke vi ne konas lin.”

“Certe, sinjoro. Mi parolis kun li telefone.”

62

Kantisto diras al sia kunulino:

“Mia filino heredis mian voĉon.”

La kunulino respondas naive:

“Jen estas kial vi ĝin ne havas.”

63

Naiva fraulino demandas sian estontan bopatrinon:

“Ĉu mi pekas kiam oni diras al mi ke mi estas bela kaj mi kontentiĝas?”

“Jes, mia filino. Dio ne permesas ke ni fariĝu kunkulpaj de mensogo.”

64

Pastro veturas fervoje, sidante inter du malĝentiluloj kies malĉasta interparolado ĉagrenas lin.

Kiam ili foriris, la patro humile diris al ili:

“Ĝis la revido!”

“Kial ĝis la revido? Eble ni neniam revidos nin.”

“Jes, ni revidos nin”, diris la pastro. “Mi estas la pastro de la malliberejo.”

65

Homo rigardas valizon en bazaro. La vendisto diras al li:

“Ĉu vi volas ĝin?”

“Por kio?” demandas la homo.

“Por enmeti viajn vestojn, tolaĵon, k.t.p.”

“Tiam mi restus nuda!”

66

“Pro kiu vi portas funebran veston?”

“Pro mia bopatrino.”

“Ĉu ŝi mortis?”

“Malplibone. Ŝi venis loĝi ĉe sia filino kaj mi.”

67

Knabeto ploregas sur la strato. Sinjoro kompatas lian ploron kaj diras:

“Kio okazas al vi?”

“Mi perdis kvin centimojn.”

“Bone, prenu aliajn kaj silentu.”

La knabo prenas la kvin centimojn kaj daurigas la ploregon.

“Kial vi nun ploras?”

“Ĉar se mi ne estus perdinta la kvin centimojn, mi havus dek.”

68

“Ĉu vi venos morgau, doktoro?”

“Jes, ne timu. Okaze, mi estas vizitonta alian malsanulon en ĉi tiu sama strato, kaj tiamaniere mi mortigos du birdojn per unu sola pafo.”

69

“Kiom mi donus por ke mi estu vi, nur du horojn!” diris al edzo lia edzino.

“Kial?” demandas scivoleme la edzo.

“Ĉar estante mi la edzo, dum tiuj du horoj mi aĉetus belegan veston por mia edzineto.”

70

La kuracisto foriras ĉasadi ĉiujare dum monato agosto, kaj oni diras ke tiu estas la sola monato kiam li ne mortigas!

71

“Estas miraklo se mi estos premiita de loterio.”

“Kiun numeron vi havas?”

“Neniun.”

“Do, kiel estas eble ke vi estos premiita?”

“Tial mi diras ke tio estos miraklo.”

72

Edzo revenas hejmen kaj trovas preĝanta sian edzinon.

“Kial vi preĝas?” li diris.

“Por via bonfarto kaj longa vivo.”

“Kiel? Ĉu vi ne diras ke vi malamas min?”

“Jes. Sed mia unua edzo vangofrapis min, vi bastonbatas min, kaj mi timas ke la tria mortigos min.”

73

Homo konsciencia diris ĉiunokte kiam li kuŝiĝis:

“Mia Dio! Mi ne petas Vin ke riĉaĵoj pluvu sur min, sed nur diru al mi kie ili estas kaj mi penados kapti ilin.”

74

“Via filo estas belega,” diris sinjorino al sia amikino, “sed ne plaĉas al mi ke li estas ĉiam tiel malĝoja.”

“Mi opinias kiel vi. Sed kion fari? Ju pli mi batas lin, des malpli li sin korektas.”

75

“Kial vi estas funebre vestita?”

“Tial ke mortis mia edzo.”

“Ho, kiel subite! Antaŭ nemultaj tagoj mi vidis lin, kaj li estis tiel forta kaj tiel...”

“Ja, vi estas prava. Tiel forta ke la tagon antaŭ sia morto li bastonbatadis min.”

76

Homo eniris butikon por aĉeti metron. Li vidis kelkajn de malsamaj specoj. Li demandis iliajn kostojn, sed ĉar li trovis ĉiujn multekostaj, li diris:

“Ili ne taugas por mi; certe mi trovos malpli kostajn en la kontraŭa butiko.”

“Eble,” respondis la vendisto. “Sed la miaj estas pli longaj ol la tieaj.”

77

Homo sur strato disdonas prospektojn al ĉiuj preterpasantoj. Sinjoro prezentas sian manon por ricevi unu. Sed la disdonanto diras al li:

“Ne, al vi ne. Vi havas barbon kaj mi anoncas razilojn.”

78

“Kara amiko, kial vi ne volas ke via filo edziĝu?”

“Tial ke mi ne volas ke mia edzino fariĝu bopatrino.”

79

Dramoverkisto renkontas amikon kiu, lau tio kion oni diris al li, malaprobis lian dramon.

“Ĉu vi vere malaprobis mian dramon?” demandis la verkisto. “Kiel mi povis malaprobi vian dramon,” diris la amiko, “se mi dormis dum ĝia prezentado?”

80

“Infano, ne petolu. Ĉesu plori, kaj lasu pace la sinjoron.”

“Li ne ĝenas min. Plaĉegas al mi la infanoj, kaj precipe kiam ili ploras.”

“Kia strangaĵo! Kiam ili ploras!”

“Jes, ĉar tiam oni forsendas ilin en liton.”

81

Ekdormis edzino kiu vigilis ĉe sia mortinta edzo. Ŝi revis, kaj vidis ke ŝia edzo sidas sur la ĉerko.

“Ne timu, edzino,” li diris. “Mi reviviĝis.”

“Sed, homo, kiam vi ĉesos ĉagreni min?”

82

“Ĉu vi multe laboris de hierau, filineto?”

“Jes, patrinjo. Mi faras la duan ŝtrumpon.”

“Kie estas la unua?”

“Nenie. Mi komencis per la dua.”

83

Fianĉo konsiliĝis kun fama poeto pri kiu el du versoj de li verkitaj kaj dediĉitaj al sia fianĉino, li devas doni al ŝi.

La poeto legis unu kaj redonis al li la alian, dirante:

“Donu al ŝi tiun ĉi ne legitan de mi.”

84

“Ĉu vi estas en tiu ĉi banejo pro via malsano?”

“Ne, sinjoro, dank’al Dio pro malsano de mia edzino.”

85

Du geinfanoj kreskis, ĝis viriĝis unu kaj viriniĝis la alia, estimante sin reciproke kaj vidigante al ĉiuj sian feliĉecon tiel senkulpan kiel tiu kiun havis Adamo kaj Evo en la Paradizo.

Iutage virino, ŝajne perfekta, diris al ambau:

“Via farmaniero ne estas bona.”

De tiam la geamikoj interparolas kaŝe, ili ruĝiĝas kiam ili publike troviĝas, kaj la protektantino diras al si mem:

“Mi ilin moraligis.”

86

“Amiko! Kiel vi povas vendi viajn balailojn po dek centimoj? Mi forrabis kanojn, ŝnuretojn, kaj palmobranĉojn, kaj mi faris malriĉan aferon vendinte ilin po dek kvin.”

“Malsaĝulo! Mi ilin forrabis jam konstruitajn.”

87

Post dek jaroj, du amikoj revidas sin kaj unu diras al la alia:

“Ĉu fine Ludovikino trovis malsaĝulon por edziniĝi?”

“Jes”, diras la demandito. “Ni estas geedzoj.”

88

Edzo, kiam li parolas pri sia edzino, ĉiam diras:

“Mia kara okono.”

Amiko petis de li klarigon pri tio, kaj li respondis:

“Mia edzino estis la duono de sia unua edzo; sekve, la kvarono de la dua; kaj la okono de mi, kiu estas la tria.”

89

Avarulo perdis unu peseton. Li kaj ĉiuj domanoj ĝin serĉas. Li ĝin trovas kaj silentas.

Lia edzino, eksciante pri tio, diris al li:

“Kial vi ne avizas pri la trovo?”

“Ĉar se oni trovus alian peseton, mi havus du.”

90

“Kiel fartas via bopatrino?”

“Ŝi fartas pli bone, sed mi ankoraŭ ne perdis tutan esperon.”

91

Notario kutimas viziti la fianc-amikojn en la antaŭtago de ilia edziĝo. Li gratulas ilin kaj poste diras:

“Memoru ke antaŭzorgema homo devas testamenti dum tuta posedo de siaj animaj sentoj, kaj post morgaŭ vi ne plu havos plenan volon.”

92

“Oni diras ke la brandon vi ŝategas.”

“Ho! Jes, sinjoro.”

“Kaj kiel vi ĝin trinkas?”

“Mi diros al vi. Unue, mi trinkis ĝin kun akvo. Poste, sen akvo. Kaj nun, kvazaŭ ĝi estus akvo.”

93

“Amiko! Kial vi ĉiam nomas kara vian edzinon, malgraŭ ke vi diras ke vi ne amas ŝin?”

“Tial ke ŝi kostas al mi la tutan monon kiun ŝi malŝparas.”

94

Johanĉjo parolas kun sia fianĉino, kaj multe rigardas la murhorloĝon.

La knabino rimarkigas lin pri tio, kaj li diras:

“Ĉu vi kredas ke mi enuas apud vi?”

“Ne”, respondas la lerta virineto. “Sed mi kredas ke vi garantie fordonis vian poŝ-horloĝon.”

95

Nepriokupa sinjoro invitis danci skrupulan knabinon.

Tiu ĉi diris al li malŝate:

“Mi vidas ke vi ne vestas gantojn.”

“Ho! Vi ne ĝeniĝu pri tio,” li respondis. “Mi lavos miajn manojn post la danco.”

96

Servanto diris al sia dormanta sinjoro:

“Sinjoro! Sinjoro! Via bopatrino ĵus mortis!”

“Ho! Kiel malĝojon mi havos morgau, kiam mi vekigos!” respondis la bofilo.

97

Fraulino surprizas sian servistinon puriganta siajn dentojn per ŝia broso.

“Kial vi tion faras?” demandis la fraulino.

“Mia mastrino,” respondis la servistino, “via dentobroso ne nauzas min!”

98

Sinjoro kiu celas ricevi la ordenon de bonfarado, diras ke li savis la vivon de multaj personoj.

“Kiel?” oni demandis al li.

“Tre simple”, li respondis. “Mi estas kuracisto de mia dudeka jaro, nun mi estas sesdekjara, kaj mi neniam ekzercis mian profesion.”

99

Edzo ricevas sian edzinon en stacidomo.

Post kutimaj edzaj salutoj, ŝi diras:

“Viaj gepatroj ne volis ke mi venu.”

“Mi tion bone kredas”, respondas la edzo. “Ili tre amas min.”

100

“La fromaĝo idiotigas tiun kiu manĝas ĝin.”

“Ne diru sensencaĵon! Mi manĝas ĝin ĉiutage, kaj mi ne pensas ke mi estas idioto.”

“Efikoj de la fromaĝo!”

101

Lau diro de Milton, reĝo povas esti kronita je la aĝo dekkvarjara, sed li ne povas edziĝi ĝis kiam li estas dekokjara; ĉar estas multe pli malfacile regi virinon ol regi regnon.

102

Enirante en teatron, junulo puŝas sinjorinon.

“Besto!” ŝi ekkrias.

“Pardonon!” petas per dolĉa voĉo la aludito.

“Vi mem, sinjoro,” reparolas la sinjorino, “mi kredis ke la puŝanto estas mia edzo.”

103

Malfeliĉa homo plendas pro tio ke neniu havas por li ĝentilaĵon, ĉar li estas malriĉa. Amiko diras al li:

“Ne suferu! Tago alvenos en kiu ĉiuj trovantaj vin sur la stratoj vin salutos.”

“Kiam?”

“Tiam kiam vi mortos.”

104

Verkisto diras pri kolego:

“Li estas spritega.”

Ĉeestanto ekdiras:

“Ja, li ne diras same pri vi.”

“Eble ni ambau eraras”, respondas la verkisto.

105

“Edzineto, mi mortas. Mi petas de vi lastan favoron: post mia morto, edziniĝu kun mia frato.”

“Ne eble, karega. Mi havas alian kompromison.”

106

Post longa vizito:

“Je Dio, sinjoro, ne prenu sur vin la ĝenon eliri kun mi ĝis la pordo.”

“Ne estas ĝeno, sinjoro, estas plezurego.”

107

“Fraulino, mi kuraĝas peti de vi...”

“Bedaurinde, sinjoro, mi jam promesis ĉiujn dancojn.”

“Pardonu, fraulino, mi ne petas dancon, sed nur ke vi ekstaru, ĉar vi sidas sur mia ĉapelo.”

108

Kelkaj amikoj ludas. El du perdantoj, unu bruplendas kaj la alia silentas. Tiu ĉi diras al tiu:

“Kial vi tiel krias? Ĉu vi ne vidas kiel mi perdas ne dirante vorton?”

“Amiko,” diras la demandito, “vi silentas tial ke viaj doloroj estas pli grandaj ol miaj, kaj mutigas vin.”

109

“Kiom edzeco ŝanĝas la ideojn!”

“Ĉu vere?”

“Jes, kredu min. Kiam mi estis fianĉo, plaĉis al mi ĉiuj virinoj, sen escepto.”

“Kaj nun?”

“Nun plaĉas al mi ĉiuj virinoj, esceptante la mian.”

110

Sinjoro invitis matenmanĝi senhontan amikon, kiu metis en sian poŝon kafkulereton. La sinjoro, kiu tion vidis, faris same kun alia kulereto, kaj diris al sia servanto kiam tiu ĉi senigis la tablon:

“Petro, vi ne kalkulis la manĝilaron antaŭ kaj post nia manĝado. Certe ne, ĉar tiu ĉi sinjoro kaj mi ŝercis forkaŝinte du kuleretojn. Jen estas unu en mia poŝo, kaj alia en poŝo de mia amiko. De nun, havu pli da zorgo.”

111

“Sinjoro! Kiam vi pagos al mi la veston kiun mi elfaris por vi?”

“Vi pensigas min pri infanoj.”

“Kial?”

“Ĉar, same kiel ili, vi faras demandojn kiujn mi ne scias kion respondi.”

112

Post la edziĝo:

“Matildo, mia bela, ni restos en la kamparo dum la tuta daŭro de nia amo.”

“Plezure. Sed prenu bileton de iro kaj reveno.”

113

Vulpo pasis iam tra korto en kiu estis pluvakvujo enhavante malmulte da akvo. Ĝian fundon rigardante, ĝi vidis en ĝi multajn fiŝojn. Incitata de ĝia manĝegemo kaj inspirata de ĝia ruzeco, ĝi sin ĵetis en sitelon pendantan de ĉeno, kaj per sia pezo facile malsupreniris en la pluvakvujojn, samtempe kiam altiĝis alia sitelo kunligita kun la dua ekstremaĵo de la ĉeno.

Manĝinte tiom da fiŝoj kiom ĝi deziris, la vulpo decidis eliri el la akvujo, sed ĝiaj penoj por la supreniro restis vanaj kaj senefikaj.

Kiam ĝi senespere ploris sian malfeliĉon, katblekoj eldistris ĝin el ĝia ĉagreno. Ekvidinte savorimedon, la vulpo ekparolis flate kaj aminde:

“Karaj amikoj, ĉu vi estas gekatoj? Estu feliĉaj je viaj amoj. Mi estas fiŝo tiel amanta vian genton ke mi estas preta tuj oferi mian vivon kaj ankaŭ tiun de miaj kunvivantaj kamaradoj por via feliĉo. Eksaltu do en la sitelon kiun vi vidas super mi, kaj tuj vi alvenos en fenestrejon kie vi eterne ĝuos la feliĉaĵojn de geedza vivo.”

La kato diris:

“Mi estas maljuna kato kaj malmulte ŝatas la danĝerajn aventurojn. Post pripensado, mi...”

“Malkuraĝulo!” blekrespondis ĝia Evo, kaj ambaŭ saltis en la sitelon, kaj reciproke ĉirkaŭ-prenitaj malsupreniris en la profundegaĵon.

Samtempe la ruza vulpo saltis sur la malsupran sitelon, eliris el la pluvakvujo, kaj ankoraŭ vivas dank’ al tiuj gekatoj simplanimaj....

Fino